Martinus Institut

N-ro 1 - 2018

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus


Resumo de klarigo pri simbolo n-ro 11

**Martinus:**
La ŝanĝo de la mensa kurso

**Martinus:**
Pereo de mondkulturo

**Ole Therkelsen:**
Martinus kaj Kriŝnamurti 1

**Ole Therkelsen:**
Nova libro de Martinus – Grand-kurso



© Martinus Institut 1981 Reg. 11

*La eterna mondbildo, la viva estulo 2, la eterna Dio kaj la eternaj difiloj*

Esperanto

# Resumo de klarigo pri simbolo n-ro 11

## La eterna mondbildo, la viva estulo 2, la eterna Dio kaj la eternaj difiloj

La simbolo montras tutecon de la universo. La universo estas viva estulo, nome Dio. Dio aperas kiel triunua principo konsistanta el la mio, la kreokapablo kaj la kreaĵoj. Dio enhavas ĉiujn ekzistantajn vivajn difilojn. Ĉiu difilo estas la sama triunua principo, kaj tial la simbolo ankaŭ simbolas ĉiun unuopan estulon. Dio kaj la difiloj vivas en eterna interagado. Ĉar la kreoorganoj kaj la spertoorganoj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj kune konsistigas la kreoorganojn kaj la spertoorganojn de Dio, tial montriĝas ĉi tie kiel realaĵo, ke Dio estas ĉie proksima, ĉiopova, ĉioscia kaj ĉioama.

Centraj detaloj en la simbolo:


La blanka kampo meze simbolas X1 aŭ la makromion, kaj la etaj blankaj kampoj ĉe la rando simbolas la mikromiojn.

- La indiko de la makromio en formo de sesangula stelo simbolas, ke ĝia manifestado kaj spertado okazas tra ses diversaj konsciostatoj, kio estas unu por ĉiu bazenergio.
- La kreopovo, X2, markiĝas per la radioaureolo ĉirkaŭ la makromio kune kun la radioj kaj la viola kampo ĉirkaŭ la mikromioj en la rando de la simbolo.
- La koloraj kampoj inter la makromio kaj la mikromioj simbolas X3 aŭ la rezulton de la kreokapablo kaj la spertokapablo de la mio. X3 estas la organismo kaj la konscio.
- X3 estas la ses vivsferoj, indikitaj ĉiu per sia koloro kaj energio. Ĉi tiuj vivplanoj estas kune kosma spiralciklo:
  ruĝa – instinkto – la plantoregno
  oranĝkolora – pezo – la bestoregno
  flava – sento – la vera homregno
  verda – inteligento – la saĝoregno
  blua – intuicio – la dia mondo
  indiga – memoro – la beatoregno
- La lokado de la terglobo markas, ke la terglobestulo apartenas al la bestoregno.
- La stelfigureto simbolas la kosman konscion kaj markas la komenciĝon de la vera homregno. Post ĉirkaŭ 3000 jaroj estos ĉi tiu homregno realaĵo ĉi tie sur la terglobo. La lastaj restaĵoj de nia hereditaj bestaj aŭ egoismaj konsciotendencoj tiam estos finspertitaj.
- La sekvaj superfizikaj ekzistoplanoj montras eĉ pli altajn mondojn, kie la vivo kulminos en saĝeco kaj amo.

Rigardu la plenan simbolklarigon de Martinus en *La Eterna Mondbildo 1*.

# La ŝanĝo de la mensa kurso

de Martinus


M1690

**1. Ĉiuj vivaj estuloj troviĝas en proceso de transformiĝo aŭ evoluo**
Ĉiu viva estulo efektive troviĝas en moviĝo, kaj ne temas nur pri tio ke nia fizika korpo moviĝas de loko al loko. Malantaŭ la fizika movo ekzistas alia formo de movo kiun oni nomas transformiĝo. Ĉiuj vivaj estuloj troviĝas en proceso pro kiu ili neniel povas resti la sama estulo kiel antaŭe. Tiu proceso de transformiĝo estas kaj fizika kaj spirita realaĵo. La fizikan transformiĝon ni travivas en formo de infanaĝo, junaĝo, maturaĝo kaj maljunaĝo. Kaj per la fizikaj sensoj la viva estulo povas travivi ke dum fizika enkarniĝo la organismo trapasas tiujn transformiĝojn. Sed fizika vivo ja ne estas nur transformiĝo de fizika organismo. Malantaŭ tiu ekstera transformiĝo troviĝas interna, mensa transformiĝo bazita sur travivado kaj spertado. Ĉiu nova travivado estas nova spertado, kaj nova spertado estas riĉiĝo de la konscio. Ĉiuj vivaj estuloj sur ĉi tiu terglobo troviĝas en proceso de transformiĝo aŭ evoluo ekde primitivaj, mensaj statoj al altintelektaj statoj en organismoj, kiuj estos multe pli bonaj iloj por travivado kaj disvolvo de kreaj kapabloj ol estas la nuntempaj fizikaj organismoj. Tiu granda proceso de transformiĝo estas speciale aktuala por tiuj estuloj kiuj troviĝas ĉi tie sur la tero kiel homoj. Kaj la kaŭzo ke ĝi estas aktuala precipe por la homoj, estas tio ke ili tiom progresis en la evoluo ke diference de la bestoj, kiuj ankoraŭ travivas nur per instinkto kaj pli primitiva sento, ili povas komenci travivi la evoluon tago-konscie.

La travivado de la besto estas speco de aŭtomata funkcio. La besto ne povas malobei iujn leĝojn de moralo, sed per sia instinkto ĝi plenumas la leĝojn kiuj validas por la bestoregno kaj por la speciala specio al kiu ĝi apartenas. Vulpo ne povas ekhavi malbonan konsciencon ĉar ĝi "ŝtelis" kokinon, kaj ankaŭ tigro ne povas tion pro tio ke ĝi mortigis alian vivan estulon. Mortigo, ŝtelo, ĵaluzo kaj multaj aliaj aferoj el simila speco kiuj inter homoj esprimas la plej altan gradon de malmoraleco, estas kulminaj virtoj en la bestoregno. Se la rabobesto ekhavus "malbonan konsciencon" ĝi ja mortus pro malsato. Sed kial do homoj povas senti malbonan konsciencon, kaj kial la homo, kiu ja ankaŭ apartenas al la bestoregno, travivas la vivon en tute alia maniero ol la multaj bestoj sur ĉi tiu terglobo.

**2. La tera homo havas kaj degenerantan bestan menson kaj komenciĝantan homan menson**
Inter la tera homo kaj la aliaj estuloj sur la terglobo kiuj apartenas al la bestoregno, troviĝas tiu grava diferenco ke la tera homo survojas el la bestoregno kaj evoluas al pli alta evolustadio, kies principoj kaj leĝoj jam komencas pli aŭ malpli influi ĝian konscion. La tera homo travivas mensan moviĝon kiu estas proceso de transformiĝo de besto al vera homo. La mensaj movoj de la besto estas instinktaj kaj ne kaŭzas konflikton en la menso. Sed ĉe la tera

homo troviĝas kaj degeneranta besta menso kaj komenciĝanta homa menso. Kaj la malharmonio inter tiuj du formoj de menso neeviteble kreas konfliktojn kaj internajn batalojn en la menso de la tera homo. La besto estas gvidata kaj direktata de sia propra sinkonserva instinkto, kiu igas ĝin instinkte fari la ĝuston en la speciala situacio kiun ĝi travivas. Kaj por la besto "la ĝusto" ĉiam signifas tion kio estas utila por ĝi mem aŭ la konservado de ĝia specio.

**3. La besto povas vivi surbaze de sia sinkonserva instinkto. Sed por atingi la feliĉon la homo devas kontraŭbatali sian egoismon**

En la konscio de la tera homo iom post iom estiĝas naturo kiu estas kontraŭ al tiu de la besto. Dum la besto estas direktata de sia propra sinkonserva instinkto, la homo pli kaj pli mem devas decidi pri sia vivoformo aŭ vivdisvolvo pere de maldorma, tagokonscia volgvidado. Tiu maldorma tagokonscia volgvidado ofte kontraŭas al tiu de la bestoregno heredita, sinkonserva instinkto, kiu ankoraŭ ekzistas en la kutimkonscio de la tera homo. Per tio estiĝas konflikto. Agi laŭ la sinkonserva instinkto aŭ la egoismo kreas ĉe la besto naturan kaj feliĉan vivtravivadon, sed agi laŭ tiu tendenco, tio kreas malfeliĉon kaj suferon ĉe la homo. Eble la homo ne tuj sentas tion ĝuste ĉar la sinkonserva instinkto estas kutima funkcio. Sed iom post iom ĝi travivas la efikojn de sia egoismo, kaj tiuj spertoj kreas moviĝon aŭ transformiĝon en la konscio. Ŝanĝo de kurso komencas okazi. Antaŭe la kurso celis "la rajton de la pli forta", kaj utili signifis utili al si mem, sed por travivi la feliĉon la tera homo nun devas komenci per sia volo mem krei feliĉon kontraŭbatalante sian egoismon kaj hereditajn bestajn instinktojn kaj avidojn sen sia naturo. Estas necese ke per sia volo ĝi devigas sin rezigni je multaj el tiuj aferoj kiujn ĝi avidas, sed kiujn ĝi ankaŭ povas komenci vidi kiel malfacilaĵojn aŭ suferojn al aliaj estuloj. Laŭ sama grado kiel per sia volo ĝi povas fari tion ĝi kreskas en novan vivstadion. Ĝia vivo komencas sekvi kurson kies celo estas vivi utile al ĉiuj, kaj kies rezultoj aŭ efikoj ne estas mortigo, rabo kaj batalo, sed proksimula amo kaj disvolvo de intelektaj kapabloj. Tio estas kapabloj kiuj transformos la teron al mondo kie humaneco, arto kaj scienco floros kiel neniam antaŭe, kaj kie la ŝtatoj unuiĝos al unu homa ŝtato kie ne troviĝas "la rajto de la pli forta".

**4. Nuntempe la homoj ŝipas sur la granda, ĥaosa, mensa oceano, kaj mankas al ili kompaso laŭ kiu fiksi la kurson.**

Multe estas jam farita por helpi la homaron antaŭen al tia stato, sed daŭre mankas io por ebligi al la homoj atingi ĝin. La religioj helpis la homojn longan vojon antaŭen, kaj la blinda kredo je savo per la religio ankoraŭ povas helpi kelkajn homojn. Sed por daŭre pli kaj pli da homoj en ĉiuj partoj de la mondo ne plu sufiĉas kredi. Ilia pure scienca sinteno al la vivo kaj ilia evoluinta inteligento malebligas al ili kredi je dogmoj aŭ ricevi inspiron de ceremonioj. Ili postulas faktojn kaj preferas kompreni kaj ne nur kredi. Mankas al ili "kompaso" laŭ kiu fiksi sian kurson. La homoj estas kiel tuta serio da etaj ŝipoj kiuj iras sur granda mensa oceano. Ili ĉiuj devas iri al la sama haveno, sed ili tre malkonsentas pri la kurso. Tial regas terura ĥaoso sur tiu maro, kaj katastrofaj kolizioj okazas ĉiumomente. Ne nur unuopaj ŝipoj kolizias kaj per tio difektiĝas aŭ detruiĝas. Povas okazi ke tutaj grupoj da ŝipoj komplete averias. Mondmilitoj, revolucioj, sabotado kaj ĉiuspecaj aliaj militagoj estas tiaj kolektivaj subakvigoj de la ŝipoj sur la mensa oceano. La ŝipoj povas subakviĝi, sed la kapitano ĉiam ekhavos novan ŝipon per kiu ŝipi. Kaj en ĉi tiu

kazo la kapitano estas la mio de la viva estulo kiu devas klopodi trovi la ĝustan kurson al la komuna celo, la komuna haveno kiu estas tiu mensa stato karakterizita kiel “la homo laŭ la bildo de Dio”.

**5. La vivspertoj instruos al la homo ke la “kompaso” devas esti proksimula amo**

Multaj el la marveturantoj inklinas opinii ke nur ili konas la ĝustan kurson kaj ŝipas absolute korekte. Sed la fakto estas ke efektive ili erarveturas kaj ne povas trovi la havenon per la rimedoj kiujn ili uzas por orienti sin. Kelkfoje per potenco kaj perforto, alifoje per fanatikaj eldiroj ili klopodas persvadi aliajn ŝipi laŭ sia kurso. Ili estas ligitaj al specialaj teorioj kaj imagoj el politika, religia aŭ alia speco, kaj ili asertas ke ties celoj estas la celoj de ĉiuj homoj. Sed neniu religia movado, neniu sekto aŭ mondreligio kaj absolute neniu el la nuntempe ekzistantaj, politikaj partioj iam ajn atingos ekhavi ĉiujn homojn de la mondo kiel adeptojn. Pli aŭ malpli ĉiuj tiuj “movadoj” movas sin en erara direkto. Ilia “kompaso” estas misgvida. Kaj kiamaniere montriĝas tiuj misindikoj de la vivkompaso? Ili esprimas sin tiamaniere ke tiuj politikaj aŭ religiaj movadoj kaj ankaŭ multaj idealismaj unuiĝoj ja parolas pri proksimula amo kaj humaneco, sed ili tute ne komprenas la naturon de la amo. Ili havas fortegan simpation al io kaj fortegan malsimpation al io alia, malsimpation kiu en certaj kazoj realiĝas kiel “sankta kolero”, “justa kolero”, ja kelkfoje kiel malamo. Sed tiel longe kiel la ŝipoj sur la mensa oceano ankoraŭ havas en si malamon aŭ malsimpation, tiel longe estas maleble por ili atingi la havenon pri kiu ili sopiras. Sed la vera homa amo kiun Kristo montris al la homoj, kaj pri kiu parolis ĉiuj saĝuloj de la pasinteco, ne montras malsimpation al iu aŭ io. Kristo diris: “Amu tiujn kiuj malamas kaj persekutas vin”, kaj li parolis pri pardonado ne nur sep fojojn, sed sepdek oble sep fojojn ĉiutage. Verŝajne neniu homo iam ajn havos okazon devi pardoni pli da fojoj en unu tago. Sed ĉu vere oni povas lerni pardoni? Tio ne eblas tiel longe kiel oni uzas nur siajn sentojn. Nur kiam per sia inteligento oni vere komprenas ke en ĉiu momento neniu homo povas esti alimaniere ol ĝi estas, ĉar per sia konduto ĝi reprezentas certan, provizoran evolustadion bazitan sur spertoj kaj travivaĵoj en la pasinteco, kaj nur tiam oni povas vidi ke ĝi “ne scias, kion ĝi faras”. Se ĝi vere havus scion pri tio ĝi ne agus tiel. Kiam oni mem ne havas koron por agi tiel kiel agis la alia homo, tiam la kaŭzo ja estas ke en sia konscio oni havas la sperton ke ne estas ĝuste agi tiel. Sed en sia konscio la alia homo ja ankoraŭ ne havas spertojn pri tio, kaj tial ĝi agas kiel ĝi faras. Sed en la futuro ĝi havos la spertojn ĉar necese ĝi rikoltos kiel ĝi semis, kaj je tiu tempo ankaŭ ĝi ne plu havos koron por agi tiel. Oni ne povas postuli de iu ajn viva estulo ke ĝi agu surbaze de spertoj kiujn ĝi ankoraŭ ne havas. Fari tion ja estus la samo kiel postuli ke infano devas agi kiel plenkreskulo. Laŭ kosma vidpunkto troviĝas multaj plenkreskaj homoj sur la tero kiuj ankoraŭ estas kiel infanoj, sed en la venontaj enkarniĝoj ankaŭ ili pli kaj pli fariĝos “plenkreskuloj”, kio signifas ke en siaj pensado kaj agmaniero ili fariĝos pli kaj pli homecaj.

**6. Per miaj kosmaj analizoj kiel “kompaso” la homo povas fiksi sian mensan kurson al mondo de paco**

Nun pluraj homoj certe demandas: “Sed ĉu ne ankaŭ la tiel nomata spirita scienco estas nur religia sekto kiu klopodas varbi prozelitojn kaj diras ke nur ĝi konas la veron?” “Ĉu ne ankaŭ ĝi estas “ŝipo” kiu klopodas persvadi aliajn sekvi sian kurson?” Al tio mia respondo estas ke surbaze de mia laboro neniam ajn

estos kreita unuiĝo, sekto, eklezio aŭ partio. Kaj responde neniun homon oni devas persvadi por ke ĝi fariĝu "membro", ĉar ne ekzistas io en kio membriĝi. Homoj interesitaj de miaj kosmaj analizoj kaj inklinaj studi la mondbildon, kiun mi priskribas en mia ĉefverko "Livets Bog" kaj aliaj libroj, ili faras tion pro tiu interna moviĝo aŭ transformiĝo kiu jam estas okazanta en ilia mensostato. Se ne jam en sia konscio ili posedas certajn spertojn, mia laboro tute ne povas interesi ilin. Necesas interna, organa funkcio, kaj tiun funkcion oni nomas proksimula amo. Ĝi estas homa amo kiu estas praktikata sen malamo kontraŭ la tiel nomataj "malbono" kaj "maljusto". Kiam tiuj "malbono", "maljusto" kaj "diablaĵo" estas rezultoj de nefinevoluinta stato, tiam ili ja ne en la aktuala momento povas esti alispecaj ol ili estas. Sed la intenco absolute ne estas ke ĉio tio devas daŭre ekzisti sur la terglobo. La evoluo aŭ la transformiĝo de la vivaj estuloj progresas, kvankam kelkfoje homoj opinias ke tio ne okazas sufiĉe rapide.

En nia tempo ni tamen troviĝas en akcelata evoluo, ĉio okazas pli rapide nun ol antaŭ jarcentoj. Tial ja fluegas spertomaterialo sur la teran homaron. La grandaj mondmilitoj, revolucioj, senlaboreco, la multaj fizikaj kaj psikaj malsanoj, la personaj malfacilaĵoj kiujn ĉiu homo spertas, ĉio tio kunefikas por fari la sopiron de la homoj al paco pli kaj pli forta. Ankaŭ ilia inteligento evoluas, kaj tial scienco kaj tekniko faras tiel grandajn progresojn. Sed scienco kaj tekniko solaj ne povas krei pacon en la mondo. Se ili povus tion fari la paco estus kreita antaŭ longe. Ankaŭ la religioj, la sektoj, kaj la partioj ne kapablas tion. Ilia potenco super la homoj pli kaj pli malgrandiĝas ĉar laŭ la evoluo de la inteligento la homoj ne povas kredi je religiaj nek je politikaj dogmoj. La ŝanĝo de la kurso, la vojo al la paco necese devas kreiĝi en la propra konscio de la unuopa homo pere de spertoj kaj travivaĵoj.

Tion ĝi povas fari ĉar homo kiu havas grandan spertomaterialon povas per studado de la kosmaj analizoj ordigi tiun materialon en sia konscio. Ĝi povas komenci vidi la kunligon kaj sencon malantaŭ ŝajne hazardaj kaj sensencaj okazaĵoj kaj travivaĵoj. Anstataŭ tio ke antaŭe la vivo ŝajnis al ĝi banala kaj triviala ĝi nun vidas perspektivon en sia travivado. Sed estas ĝia propra spertomaterialo kiun la homo havas kiel bazon. Kaj per la laboro pri si mem sekvante la spiritan sciecon ne nur teorie sed ankaŭ praktike ĝi havas la eblon fiksi sian kurson al tiu mensa haveno kiu estas tiu paco al kiu sopiras la homo. Ĝi fariĝos interna realaĵo ĉe la homo, sed ĝi estos ankaŭ ekstera realaĵo per tio ke en la ĉiutaga vivo ĝi elradios tra la pensoj, sentoj kaj agoj de la homo.


Kiamaniere oni povas scii ĉu per sia mensa ŝipo oni sekvas la kurson al la haveno de la paco? Oni povas senti tion pere de siaj reagoj al la ĉirkaŭaĵoj. Se facile oni koleriĝas, fariĝas acida aŭ ĉagrenita kaj sename kritikas la sintenon kaj estmanieron de aliaj homoj tiam la kompaso havas eraron, kaj kolizioj aŭ surgrundiĝoj estas risko. Sed se oni mobilizas sian volon kaj petas la providencon pri helpo por trakti la unuopan situacion kaj renkonti la unuopan homon kun tiu simpatio kaj tiu formo de amo kiuj plej utilas en la koncerna momento, tiam malaperos la malhelaj ombroj de la kolero kaj ĉagrenoj, kaj la suno de la proksimula amo radios kaj brilos tra la konscio.

Originala dana titolo: *Den mentale kursændring*. El prelego de Martinus en Kosmos Ferieby, Klint, lundon la 9-an de aŭgusto 1948. La manuskripto estas prilaborita de Mogens Møller. La prilaboro estas aprobita de Martinus. Unuan fojon en Kontakt-letero n-ro 23, 1958. Artikolo n-ro: M1690. Traduko Ib Schleicher

# Pereo de mondkulturo

## de Martinus

M2540



**1. Iam la grandaj mondreligioj regis la mondon**

Ni vivas en tre maltrankvila tempo. Dum jarmiloj la grandaj mondreligioj formis la firmajn bazon kaj idealon por la moralo kaj konduto de la homoj. Sed nun ili ne plu ludas la saman rolon en nia kulturkreado kiel ili faris antaŭe. Preĝejoj kaj temploj, kaj eble plej multe aŭtoritata pastraro gvidanta la ceremoniajn kaj sakramentajn agojn, sugestiis la homaron por kredi je ekzistanta providenco, kaj je moralo kaj konduto kiujn preskribis tiuj religiaj institucioj kiel esprimon pri la plej alta etiko kaj homa perfekteco.

La portanta faktoro en tiu kulturkreado sekve fariĝis la kredo je ekzistanta providenco, kaj je tio ke malantaŭ ĉiuj ekzistantaj vivtravivaĵoj troviĝas diaj plano, senco aŭ intenco. La homoj por kiuj tiu predikado estis destinita plej altgrade havis religian instinkton kiu simple kondiĉis, ke ili trovis la penson pri la ekzisto de dia providenco natura aŭ memkomprenebla, kaj tial la pastraro ne renkontis grandan kontraŭstaron. La grandaj mondreligioj reale regis la mondon. Sed la religia instinkto aŭ la interna funkcio malantaŭ la kapablo aŭ tendenco de la kredanta homo fidi la ekziston de providenco, ne estas homa eltrovaĵo. Ĝi estas kunnaskita animorgana funkcio, kiun ni renkontas jam en la bestoregno, kie la mortotimkrio de la besto efektive estas la unua, senkonscia sinturno pri helpo de iu por ĝi absolute nekonata providenco. Por kio alia okazas tiu mortotimkrio, kiu realiĝas nur kiam ĉiuj naturaj helpiloj de la besto estas eluzitaj? Neniu, ankaŭ ne la besto mem, atendas ke ĝia persekutanto kaptiĝas de kompato kaj domaĝas ĝin. La rabobesto ne konas kompaton, kiu efektive estus ĝia propra sinmortigo.

**2. Por la naturhomo providenco estas memkompreneblaĵo**

Ankaŭ ĉe ĉiuj naturhomoj ni renkontas tiun instinkton, tiun senseton pri la ekzisto de providenco. Ja en tiu regiono tiu sento estas tiel evoluinta, ke en tiuj vivstadioj ni eĉ ne trovas unu solan "malkredanton". La providenco aŭ la spirita mondo estas memkompreneblaĵo por ĉiu naturhomo. Tiu kapablo, tiu religia instinkto sekve troviĝas en ĉiu estulo precize sammaniere kiel la kapablo fariĝi planto troviĝas en ĉiu semero, kaj same kiel la kapablo fariĝi besto el tiu aŭ alia specio aŭ raso estas enigita en la semero de ĉiu besto. Por la evoluinta homo do estas neskuebla fakto, ke la kapablo kredi je ekzistanta, spirita providenco ne estas eltrovita de iu homo, sed male estas io psika-organa ĉe la viva estulo. Sed la imago de la tera homo pri tiu providenco ĉiam estas produkto de ĝia fantazio aŭ imagokapablo. Kutime ĝi ĉiam imagas tiun providencon "laŭ sia propra bildo", sed laŭ multe pli perfekta stato ol tiu, en kiu ĝi mem troviĝas.

**3. La homo inklinis imagi la providencon laŭ sia propra bildo**

Ĝuste pro sia inklino bildigi providencon aŭ dion laŭ sia propra bildo la di-

versaj popoloj ĉiu unuope havis dum la tempoj sian specialan imagon por adori aŭ kulti. Sed komuna por ili ĉiuj estis ilia kunnaskita kapablo aŭ tendenco kredi, ke necese ekzistas providenco, unu aŭ eble pluraj dioj. Tiu instinkto aŭ tiu tendenco estis tiamaniere direktata aŭ gvidata de profetoj, pastroj ktp., ke ankoraŭ nuntempe sennombraj milionoj da homoj estas ligitaj de tio kaj sekve havas la imagon pri ekzisto de dia providenco.

**4. La vivsinteno ŝanĝiĝis de abstrakta al konkreta enhavo**

Se ni observas la nuntempan homon ni vidas, ke kaj en la batalo por la ĉiutaga pano kaj sur multaj aliaj kampoj ĝi troviĝas en situacio, kiu donas al ĝi sennombrajn spertojn kun kiuj ĝi antaŭe ne havis kontakton. La moderna, teknika socio influas la homon multe pli intence ol faris la sociformoj de la pasinteco, kiuj sekvis tute alian vivritmon ol tiun, kiu nuntempe karakterizas la vivon de la meznivela homo. La rezulto de tio fariĝis, ke malrapide la moderna homo komencas forkreski de la kapablo vivi surbaze de abstraktaĵoj. Ĝia progresigita vivritmo donas al ĝi sennombrajn, novajn spertojn, kio neeviteble sekvigas ke la vivsinteno ŝanĝiĝas de abstrakta al konkreta bazo. La daŭra spertoevoluo kaŭzas ke la inteligentokapablo de la tera homo nun evoluas tre forte. Tio sekvigas, ke nesciante tion ĝi ofte venis en staton, kie laŭgrade ĝi liberigas sin de tiuj ligiloj, kiuj ĝis nia tempo tenis ĝin je imagoj kiujn nuntempe ĝia inteligento malkaŝas kiel nerealaj, ja kiel konfliktaj kun tiu logiko kiun la vivo malkaŝas sur ĉiuj kampoj. La inteligentokapablo do pli kaj pli anstataŭigas tiun instinkton kiu antaŭe realigis ĝian senstravivadon. La provizora rezulto de tiu proceso estas ĉe la unuopa homo ĝia kreskanta materiismo, ĝia kreskanta postulo pri pli granda parto de la pure fizikaj vivbonaĵoj. La instinktofunkcio realigis la kapablon kontakti la psikajn aŭ abstraktajn regionojn de la vivo. Kaj nun ni vidas ke aliflanke la inteligento estas forto per kiu la homo en daŭre pli kaj pli alta grado kapablas malkaŝi konkretajn faktojn.

**5. la evoluo de la inteligentokapablo malaperas la kapablo blinde kredi**

La evoluo do sekvigas ke laŭgrade la tera homo perdis sian instinktan kontakton kun la psikaj regionoj de la vivo favore al plenklara, inteligenteca spertado de la fizika sfero, la tute fizika mondo. La rezulto de tio klare vidiĝas per tio, ke samtempe kun la kreskado de la inteligentokapablo reduktiĝas la kapablo blinde kredi. La moderna homo preferas bazi sian vivon sur spertoj konfirmitaj per inteligento, anstataŭ sur nebulecaj, instinktaj aŭ sensetaj perceptoj. Ĉar ĝia plej grava spertomaterialo tralumita de la inteligento estas ligita al la materia mondo, necese la materiismo unuavice venkis. Ne la homo, sed la vivo mem kondukis la homon en tiun kulminan materiismon kiu nuntempe regas la mondon.

**6. Materiismo progresigas sendiecon**

Nuntempe rigardi la mondon signifas vidi homaron, kies plimulto akceptas nur tion kion pure fizike oni povas pesi kaj mezuri. Nur la fizika substanco estas alirebla por fizika sensado, estas pesebla kaj mezurebla, kaj tial ni vidas ke sole ĝi estas objekto por la ĉefaj interesoj de la moderna homo. Je ĝi oni kredas. Oni ne vidas kaj sekve ne kredas je la viva Io kiu efektive ekzistas kiel la organizanto de la substanco, kiel tiu faktoro kiu transformas la substancon kaj faras ĝin uzebla kiel organismo por tiu Io, aŭ kiel objektoj por ĝia uzo. Tiu viva Io efektive identas kun la diulo,

kun la eterna faktoro malantaŭ la portempaj aferoj kaj tial plej esence identas kun Dio. Sekve pro sia mankanta intereso pri la reala ekzisto de tiu viva Io la moderna homo fariĝis sendia.

**7. En la materio la scienco vane serĉas la solvon de la vivmistero**

Nuntempe esti religia sekve estas la samo kiel esti naiva. Por intelekta homo estas honta afero kredi je aŭ inklini al konceptoj apartenaj al malaperinta pasinteco, al la "spirita infanĉambro" de la homo. Pro la kreskanta inteligentokapablo oni venis al la sinteno, ke la solvo de la vivmistero estas el pure materia naturo, estas trovebla en la mondo de la substanco. Necese ĝi estas io pesebla aŭ mezurebla, necese ĝi estas temp- kaj spacdimensia. Vane la scienco serĉis kaj daŭre serĉas tiun solvon povante doni nur tiun respondon, ke ĉio ŝajne baziĝas sur la nekontrolebla ludo de hazardoj. Ĉio ekster la mondo de la homo, kaj ĉi tie ankaŭ ĉiuj ceteraj, vivaj estuloj, kaj la universo kun ĝiaj sennombraj sunsistemoj kaj galaksioj, reale estas nur hazardaj, malvivaj fortoj. Nur hezite oni pensas ke aliaj planedoj ol tero estas loĝataj. Vesperon post vespero tiu senfina stelaro preterglitas niajn mirantajn okulojn, tiuj grandiozaj, kosmaj sistemoj sekvas jarmilojn post jarmiloj precize fiksitajn vojojn. Ĉiuj el ili estas nur la hazarda ludo de tiuj malvivaj fortoj, estas malvivaj materikombinoj sen ia ajn pli alta celo. Nur la tero, tiu polvero de la polveroj en makrokosma gigantomondo estas dotita per pli alta vivo, sole nur tie en tiu grandioza, tiu nesuperrigardebla kaj netravidebla universo troviĝas vivo, troviĝas pensantaj homoj!

**8. Pure materia esplorado ne donas ian ajn gvidlinion pri moralo aŭ konduto**

Sed ĉu tio ne estas la samo kiel kulti la morton? Se nia mondo estas la sola, loĝata planedo en la universo, kaj la vivo ĉi tie estas nur produkto de "heredo kaj medio", de "genoj" kaj "kromosomoj", kaj ĉiu parolo pri persona senmorteco estas hontiga sensencaĵo, tiam nia mondo ja necese estas la mortoregno mem, kaj nia planedo estas la plej stranga "kadavro" kiu iam ekzistis. La vivfilozofio tuŝita ĉi tie estas la ekstrema konsekvenco de pure materia aŭ temp- kaj spacdimensia esplorado. Tiu esplorado donas nur pure materiajn informojn, sed ne ian ajn gvidlinion pri moralo aŭ konduto. Por ĝi la vivo estas nur fizika proceso, kaj sur tiu kampo ĝi kulminas en tiu scio kiu nomiĝu genia, ĉar dank' al tiu scio la homo fariĝis mastro super la elementoj. Surbaze de tiu scio sennombraj milionoj da ĉevalpovoj nuntempe laboras por la homaro. Ĉie la homoj nuntempe premas butonojn, kaj sekve maŝinoj centmilope produktas utilobjektojn. Premante butonojn, turnante tenilojn ktp. ili ekhavas lumon kaj varmon en siaj loĝejoj, ili ŝipas sub la maro, sur la maro kaj rapidegas tra la aero. Envere sur certaj kampoj la homo fariĝis simila al Dio. Ekipita per potenco kiel neniam antaŭe la homo ordonas, kaj la substanco obeas al ĝia volo. Sed malantaŭ tiu potenco, malantaŭ tiu tuta dia povo ekzistas la malkredo, la sendieco. Meze en sia tuta, genia inteligenteca povo la tera homo fariĝis kosme senkonscia estulo!

**9. Nuntempe la homaro havas teorian eblon ekstermi sin mem**

Ĉi tie en la okcidento ni ĉiuj estas edukitaj en la kristana kredo, kaj ĉiuj aŭdis pri la du arboj en "La ĝardeno de Edeno", "La arbo de sciado" kaj "La arbo de la Vivo". Kaj ni ĉiuj lernis, ke "Tiun tagon, kiam vi manĝos la fruktojn de la arbo de sciado, vi mortos"! Tiu por multaj tiel enigma antaŭdiro kulmine plenumiĝis en nia tempo kaj en nia mondo. Ĉie kien ni turnas niajn

okulojn ni vidas, ke la plej altranga rezulto de la kontakto de la homo kun la inteligento fariĝas la kapablo ekstermi vivon tiel amplekse, ke eĉ ne la plej vigla fantazio kapablas imagi tion. Nuntempe la sinekstermo de la homaro per rimedoj kiujn ĝi mem produktis, estas almenaŭ teoria eblo. Sed vivdisvolvo kies celo estas morto kaj korpodifekto por sennombraj milionoj da homoj kaj bestoj, kies celo estas ekstermo de ĉia vivo en grandegaj landregionoj, ĉu ĝi estas esprimo de altintelekteco? Absolute ne! Ĝi estas esprimo nur pri tiu kosma morto kiun kaŭzus la ĝuado de la fruktoj de "La arbo de sciado". Tio ke homoj detruas homojn ja efektive signifas ke la homa raso detruas sin mem. Tia stato ne troviĝas ĉe aliaj vivoformoj sur la tero. Leonoj ne mortigas leonojn, kaj tigroj ne mortigas tigrojn. Kiam escepte okazas tia mortigo, ĝi estas nur rezulto de periodaj, seksardaj bataloj, kaj neniam tiuj mortigoj estas danĝeraj por la ekzisto de la raso aŭ specio. Sed la homoj ne mortigas nur per la nudaj manoj. Por ĝi ne necesas mortigi nur per sia propra, fizika organismo. Ne, ĝi konstruis maŝinojn kun tia mortigokapacito, ke per nura premo sur butono ĝi povas ekstermi milionojn de sia propra raso. Envere la homo fariĝis la perfekta mortiganto, la genia besto. Tial ne estas mirige, ke la efikoj de tiu stato estas mondo en timo, mondo kie nun "ĉies batalo kontraŭ ĉiuj" trafuriozas ĉiujn kontinentojn kaj marojn de la terglobo.

### 10. Nek la kristanismo nek aliaj mondreligioj povas malhelpi la pereon de la ekzistanta mondkulturo

Ke tiu situacio estiĝis, tion nek la kristanismo nek la aliaj modreligioj povis malhelpi, kaj same ili ankoraŭ malpli povas ĉesigi tiun staton. Tial la nuntempe ekzistanta mondkulturo daŭre reduktiĝas. Kaj daŭre milito kaj armado estas la aktualaj, mondaj problemoj, kiuj foruzas ĉiujn valoraĵojn kaj la tutan laborforton sen kiuj ne eblas konstrui novan kaj veran mondkulturon. La timo de novaj militoj nuntempe konservas "ĉies militon kontraŭ ĉiuj". Kaj konsekvencoj de tiu timo estas malriĉo kaj mizero, invalideco kaj mortostertoro, malmoraliĝo kaj epoko de kareco, aŭ ĉio kio krias al la ĉielo pri manko de kulturo, manko de tiuj spirito, arto kaj proksimula amo, kiuj ĉiam lumas tie kie reala, vera altintelekteco regas la animan vivon.

### 11. La mondreligioj donas koncentritajn vivrezultojn, sed ne inteligentecajn analizojn de la vivmistero

Kio estas kaŭzo ke nek la aziaj religioj kaj nek la kristana mondreligio kapablas savi aŭ liberigi la homaron el tiu ĉioampleksa "ĉies milito kontraŭ ĉiuj"? Efektive la kaŭzo estas tiu simpla, ke neniam tiuj religioj estis destinitaj aŭ adaptitaj por doni al la homo klarajn, inteligentecajn analizojn pri la vivmistero, sed ekskluzive nur serion de koncentritaj vivrezultoj kulminaj en la postulo pri proksimula amo aŭ tre alta grado de humaneco. La religioj ne estas kreitaj al homaro de universitate edukitaj estuloj, sed male al homaro kiu ankoraŭ posedis la kapablon kredi senkondiĉe. Tial ni vidas, ke daŭre la religio kapablas doni spiritan nutraĵon al ĉiuj tiuj homoj kiuj ankoraŭ kapablas vivi surbaze de nedifinita sentotravivado de la plej profundaj problemoj de la vivo. Ĝuste al tiuj homoj ĝi donas siajn vivrezultojn kun la vortoj: "Tio kion homo semas, tion ankaŭ li rikoltos" – "Amu vian proksimulon kiel vin mem" – "Remetu vian glavon en ĝian ingon, ĉar tiu kiu glavon prenas, per glavo pereos" – "Ne mortigu" ktp. Sed la religio ne donas iun pruvon pri la scienceco de siaj postuloj. Ĝi postulas blindajn obeon kaj

kredon, kaj por siaj postuloj ĝi ne donas motivojn esploreblajn per la inteligento. Senrezerve ĝi postulas esti plej alta aŭtoritato en tiuj aferoj, kaj per la vortoj "La vojoj de Dio estas ne esploreblaj" ĝi rifuzas ĉian intelektan intervenon.

**12. La pensanta homo ne plu kapablas klini sin antaŭ spirita diktaturo**

La pensanta homo postulas rajton memstare taksi ĉion kio ĝi travivas. Ĝi deziras uzi la spertojn kiujn ĝi akiris per la materia scienco kaj tiel ne plu kapablas klini sin antaŭ spirita diktaturo. Se prezentiĝas al ĝi aserto, ĝi postulas ĝin prilumita kaj konfirmita ne nur por la sento sed ankaŭ por la inteligento. Kaj ĝuste rilate al tiu postulo la koncernaj religioj en la mondo malsukcesas. Ĉar same kiel ili estis bonega nutraĵo por la sento, tiel same ili estas maleblaj por la inteligento. La religioj ne estas kreitaj por homoj kiuj postulas konkretajn faktojn. Ke tiel estas, montriĝas klare se ekzemple ni provas observi la kristanismon en lumo de la inteligento. Kio estas la kerno en la kristanismo? Sendube ĝi konsistas el la instruoj kiujn Kristo mem donis al la homoj. Ĉu ne ni lernis ĝuste tion, ke Kristo diris en situacio kie unu el liaj disĉiploj tiris sian glavon kontraŭ la asistantoj de la ĉefpastro: "Remetu vian glavon en ĝian ingon, ĉar tiu kiu glavon prenas, per glavo pereos!" Krome ni lernis "Al tiu, kiu batas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian!" Kaj sur la kruco li diris: "Patro, pardonu al ili, ĉar ili ne scias kion ili faras!" Kaj fine li predikas, ke "Oni amu Dion super ĉiuj aferoj, kaj sian proksimulon kiel sin mem!"

**13. Nuntempe sur multaj kampoj la kristanismo estas miksita kun paganeco**

Ĉu iuj povas kontesti ke tiuj puraj vortoj de Kristo estas la plej interna kerno de la kristanismo? Certe ne! Sed en tiuj vortoj ne troviĝas ia ajn defendo por milito. Tie absolute ĉia milito estas anatemita. Tamen la kristanaj ŝtatoj estas la plej militemaj. En ili "la militscienco" atingis la plej altajn nivelojn, ja en ili ni nuntempe trovas la plej terurajn mortigilojn iam kreitajn, nome la atoman kaj hidrogenan bombojn kaj verŝajne ankaŭ baldaŭ la ĉiodetruan, kobaltan bombon. La kristanaj homoj fariĝis la plej grandaj mortigantoj de la tero kaj kapablas en la daŭro de momentoj ekstermi milionurbojn kaj krom tio ĉion vivan en distanco de miloj da kilometroj. Ĉu ne la mortigokapablo de la homo estas milfojojn pli granda ol tiu de la tigro? Kiam tamen en la pastraro de la kristana eklezio oni benas la armilojn kaj petas la ĉielon helpi armeojn por venki, do la kaŭzo de tio necese estas ke pro la formo laŭ kiu la kristanismo estas instruata en lernejoj kaj instruejoj, ĝi ankoraŭ ne ekzistas en tiu pura formo kiu estas esprimata en la antaŭe cititaj instruoj kaj kiun plenumis ĝia origino. Ĉio miksita en ĝin, kio havas tendencojn beni kaj idealigi perforton, necese estas kontraŭa al la klaraj instruoj de Kristo. Milito, mortigo kaj subpremo de homoj estas malo al tiu kristanismo kiun Jesuo mem instruis. Sed malo al la vera kristanismo povas esti nur ne-kristanismo aŭ antikristo, kiu plue estas la samo kiel paganeco. La mondo do ne estas regata de vera kristanismo, sed male grandskale de kristanismo, kiu sur multaj kampoj estas miksita kun paganeco. Ke ankaŭ la kristana dikoncepto ne estas kristana laŭ pura formo, tio ne plibonigas la aferon. Tie oni lernas pri dio, kiu kaj koleriĝas, kaj punas kaj venĝas. Oni lernas ke dio favoras iujn homojn, savas ilin kaj lasas ilin veni en sian ĉielon, dum aliaj ekhavas mizeran vivon en eterna fajro. Oni predikas eternan inferon por ĉiuj kiuj ne kredas je tiu dio,

samtempe kun tio ke oni instruas ke li kreas ĉiujn vivajn estulojn. Oni klarigas ke li estas ĉiopotenca kaj ĉioscia. Sed se li estas tia, li necese anticipe scias, ke tiu aŭ alia homo sekvos vojon al eterna perdiĝo, al eterna infero. Kial li kreas tiujn estulojn? Sed kial li ne kreas ĉiujn tiamaniere, ke ĉiu unuopa estulo finfine venos en lian helan ĉielon? Ja krome oni asertas, ke la tre plej granda parto "iras al infero", dum nur la eta grupo estos savita. Sed se ne anticipe Dio scias kiu iros al la infero kaj kiu iros al la ĉielo, tiam li ne estas ĉioscia. Kaj se li anticipe scias kaj ne povas malhelpi tion, tiam li ne estas ĉiopotenca. Kaj se li kapablas savi tiujn estulojn de la terura sufero de la infero, sed ne faras tion, tiam li ne estas ĉioama. Por kiu utilo estas cetere tiu eterna infero, kiam neniu povas elveni de ĝi? Kiam Dio tamen kreas la plej grandan parton de la homaro tia, ke neeviteble ĝi venos tien kaj ke sekve ne povas ekzisti alia celo por tiuj estuloj, do ja necese estas agrable por li vidi ilin esti suferigataj. Se tiel estas, tiam li estas ne nur ne ĉioama, tiam li estas ankaŭ vere perversa, vere sadisma.

**14. La homoj nek komprenas nek vivas laŭ la pura instruo de Kristo**

Ja tia fakte estas la konsekvenco de la pure inteligenteca klarigo pri tiuj informoj, kiujn la aŭtoritata kristanismo donis al ni. Ne estas strange, ke tia groteska, tia sadisma dibildo ne daŭre povas esti la spirita fundamento por la moralo kaj konduto de la homoj. Ankaŭ ne estas strange, ke necese naskiĝu homo en karno kaj sango, kiu povis montri al la homoj menson kaj konduton, kiu rilate al amo multege superbrilas la paganan dibildon. Tiu homo estis la mondliberiganto Jesuo Kristo.

Estas tute nature, ke la pura instruo de Kristo ne povis dum jarmiloj esti miksita kun la pagana atmosfero sen esti malbonigita, sen esti deformita favore al la paganeco. Kaj kiel mi jam informis, liaj puraj kaj amaj instruoj fariĝis nur rezultoj, kiujn oni ja predikas de centmiloj da podioj en la mondo, sed kiujn oni tute ne komprenas kaj ankaŭ ne obeas. Kvankam tiu bildo de Dio kiun Kristo donis al ni, multe superbrilas la dibildon de la Malnova Testamento, la rezulto tamen ne tiom fariĝis tio, ke oni sekvis lian ekzemplon, kiel tio ke oni konceptis Kriston kiel estulo kiu devis mildigi la koleron de Dio al la homoj per tio, ke li prenis sur sin la punon por tiuj pekoj kiujn ili faris.

Sed ĉu tio estas honoriga por Dio? Se li povis pardoni al la homoj, tiam estas ja strange, ke por liberigi la aliajn el la eterna perdiĝo li lasis senkulpan homon kiel Jesuo krucumiĝi por liberigi la aliajn el la eterna perdiĝo. Multe pli tia sinteno kaj agmaniero pensigas pri perverso ol pri ĉioamo. Ne, ĉiuj tiuj imagoj multe tro klare montras nelogikan, homan pensadon. Tio estas dio kreita laŭ la bildo de la homo kaj kun homaj difektoj aŭ neperfektecoj. La neperfekteco aŭ paganeco de la Malnova Testamento vastiĝis profunde en la rakontojn de la Nova Testamento aŭ baza libro de la kristanismo.

**15. Meze en la plej profunda mallumo proklamiĝas la naskiĝo de nova epoko**

Estas ja vere kompreneble, ja eĉ rekte memkompreneble, ke tia dibildo ne dum ĉiuj tempoj povas esti la spirita vivfundamento por la homaro, sed ke necese venas tempo en kiu okazas ŝanĝiĝo. La unua efiko de tiu ŝanĝiĝo estas la granda elmembriĝo kiun spertas la mondreligioj sur la tuta tero. Ĉie kie la materia scienco influas en edukado kaj lerneja instruado, tie degeneras la kredo je la malnova dikoncepto kaj la kun ĝi kunligita religia kulto. La

materiisma sendieco estiĝas, kaj oni komencas kredi je la ludo de hazardoj kaj je la senviveco de la naturo, malgraŭ la grandega, logika kreado, kiun oni vidas en nia propra organismo kaj ekster ĝi en la proksima kaj en la plej malproksima partoj de nia senshorizonto.

Por la moderna homo la vivo reduktiĝis al treege konkreta kono pri la materio kaj ĝiaj fortoj, samtempe kun tio ke preskaŭ komplete ĝi perdis la kontakton kun la psika flanko de la vivo aŭ kun tiu flanko kiu efektive esprimas aŭ estas la vivo mem. La sentema, religia mondo vivas en la kredo je mankhava dio, kaj la materia aŭ fizike-materia mondo vivas en la kredo je sendieco, je hazardo aŭ kaoso. Ambaŭ konceptoj malkaŝas efektive grandegan superstiĉon. Sed nenio povas daŭre ekzisti surbaze de superstiĉo, kaj malgraŭ tio ke la nuntempa mondkulturo kreis tiom da geniaj mirindaĵoj, ĝi estas malgraŭ sia tuta genieco mondo en disfalo. La moderna homo senestas veran, spiritan vivfundamenton. Ĝi estas estulo meze inter du grandiozaj vivepokoj, sed tion ĝi ne scias. Nuntempe ĝi pli kredas je la morto ol je la vivo. Tute reale ĝi spertas pereon de grandega, spirita mondo, sed tiuj kiuj vere havas "okulojn per kiuj vidi" kaj "orelojn per kiuj aŭdi" antaŭ longe "vidis" la unuajn vibrantajn radiojn de nova, kosma sunleviĝo super la mondon kaj antaŭ longe "aŭdis" la sonon de tiu muziko de la sferoj, kiu ĉiam en la plej profunda mallumo proklamas la naskiĝon de nova epoko. Ĝi estas epoko en kiu la sola, vera Dio de la vivo denove estos la centra afero en ĉia pensado, kaj kie la proksimula amo elpurigita de ĉia besta skorio lumas de poluso al poluso.

Originala dana titolo: *En verdenskulturs undergang*. El prelego de Martinus en Studenterforeningen, Kopenhago, la 17-an de septembro 1948. La manuskripto estas prilaborita de Erik Gerner Larsson. La prilaboro estas aprobita de Martinus. Unuan fojon en Kontakt-letero n-ro 25-26, 1956. Artikolo n-ro: M2540. Traduko Ib Schleicher



Pixabay



# Martinus kaj Kriŝnamurti 1

## Pri la venonta mond-instruisto, parto 1 el 3

de Ole Therkelsen

**1. La malnovaj profetaĵoj pri venonta Mesio aŭ mondosavanto**
En la *Malnova Testamento* oni profetas pri nova Mesio venonta, kaj la judoj atendis ke li aperos inter ili. Sed Kristo naskiĝis humile en stalo, li parolis sur monto kaj vagadis en dezerto, vestite nur per tuniko kaj sandaloj, li iĝis nek skribisto nek ĉefpastro de la templo. Ne, evidente ne estis nova vino verŝota en malnovajn sakojn, kiel diras la Biblio.

La novan mond-instruiston akceptis fiŝkaptistoj, prostituitinoj, pekuloj kaj impostistoj. La judoj kun la *Malnova Testamento* ne agnoskis Kriston kiel la novan Mesion kaj pro tio ankaŭ ne agnoskas la *Novan Testamenton*. Ili elektis daŭrigi la malnovan mondan moralon, la venĝan moralon kun okulo pro okulo kaj dento pro dento, kaj ili tial devas pluatendi la venon de Mesio, kiu estis profetita en la Malnova Testamento.

Atendas ankaŭ la kristanoj, de 2000 jaroj ili atendas la plenumiĝon de la profetaĵo pri "la reveno de Kristo" en la mondofina tempo. – *La Tria Testamento* verkita de Martinus estas neagnoskata de la dogmemaj kristanoj, kiuj nomas Martinus-on falsa profeto. – Montriĝos ĉu ripetiĝos la historio, t. e. ĉu la kredantoj malakceptos la novan mond-instruon kaj ĉu la niatempaj paganoj, la humanaj materiistoj, estas tiuj kiuj agnoskos la novan mondinstruon.


La ekleziaj kristanoj estas tre singardaj, ĉar ja estas skribite, ke dum la mondofina tempo venos multaj falsaj profetoj, eĉ ke parto el ili ŝajnigos sin esti Kristo mem. Sed eĉ se venos multaj falsaj profetoj dum la mondofina tempo, necesas ja memori ke unu el ili devas esti la ĝusta!

Kiel do eblos determini ĉu temas pri falsa profeto aŭ ne? – Nu, ĉi tie daŭre validas la saĝaj vorto de Kristo, ke oni konu la arbon laŭ ĝiaj fruktoj!

**2. La teozofiaj profetaĵoj pri nova mondosavanto**
Same kiel Kristo rakontis pri sia reveno, ankaŭ la mond-instruisto Budho profetis sian revenon kiel Majtrejo aŭ la Budho Majtrejo. Komence de la 20-a jarcento oni en la teozofiaj rondoj ankaŭ profetis ke baldaŭ venos nova Mesio, ia Kristo aŭ Lordo Majtrejo.

Annie Besant (1847-1933), kiu dum multaj jaroj estis prezidantino de la Teozofia Societo, faris multnombrajn prelegojn pri tiu temo, kaj ŝi ankaŭ verkis *La plej proksima estonteco* kaj *La reveno de Kristo* (1912). La teozofoj do diligentege serĉadis la novan mondosavonton.

Jidu Kriŝnamurti naskiĝis la 11-an de majo en suda Barato, kaj li vivis dum 1895-1986, kvin jarojn pli malfrue ol Martinus (1890-1981). Laŭ hindua tradicio la oka infano, se filo, estis nomata laŭ la dio Kriŝna, omaĝe al ĉi tiu.



*Kriŝnamurti, Charles Leadbeater kaj Annie Besant*

Ankaŭ laŭ malnova moro de altkastaj bramanoj, li estis konata per sia individua nomo – Kriŝnamurti. Martinus Thomsen sammaniere deziris interrilati kun ĉiuj per la individua nomo.

En sia libro *Krishnamurti – The years of awakening* (Kriŝnamurti – la jaroj de vekiĝo, Londono 1975) Mary Lutyens (1908-1999) skribas, ke la konata teozofo Charles Webster Leadbeater (1854-1934) en aprilo 1901 malkovris Kriŝnamurti-n proksime al la teozofa ĉefsidejo en Adyar, kiam li kun du pli junaj asistantoj iris al la plaĝo por bani sin kaj iom ekkoni la lokon. Li poste rakontis ke unu el la knaboj ĉe la plaĝo havis la plej mirindan aŭron kiun li iam vidis, sen eĉ la plej malgranda ero da egoismo. Leadbeater sentis ke ĉi tiu knabo estos ilo de Lordo Majtrejo (Kristo) kiel la nova mondosavanto, kaj ke li estis kondukita al ĉi tiu knabo por helpi kaj trejni lin por tiu tasko. En ĉi tiu teozofia rondo oni opiniis ankaŭ ke Lordo Majtrejo posedis la korpon de la disĉiplo Jesuo dum la lastaj tri jaroj de ties restado sur la fizika nivelo, kiam li kiel Kristo donadis sian instruon.

Rudolf Steiner (1861-1925), kiu ankaŭ estis teozofo, same opiniis ke Jesuo kaj Kristo ne estis unu sama persono. Sed li ne konsentis kun Besant koncerne la demandon pri Kriŝnamurti kaj la reveno de Kristo, kaj en 1912 li rompis kun la teozofoj kaj fondis sian antropozofion. Eble Steiner mem kredis ke lia antropozofio estas tio kio savos la mondon.

### 3. Kriŝnamurti ekprezidas la "Ordenon de la Orienta Stelo"

Annie Besant en 1909 iĝis guvernisto de la tiam 14-jara Kriŝnamurti, kiu tiamaniere intime ekkonis la teozofion



*Rudolf Steiner kaj Annie Besant*

interalie en la ĉefsidejo en Adyar apud Madraso (nun nomata Ĉenajo) en la suda parto de Hindio (nun Barato). Nelonge poste ŝi adoptis Kriŝnamurti-n kaj ties pli junan fraton, post kiam la patrino mortis, kaj la patro restis sola kun granda gefilaro. Ekrimarkinte la entreprenon de "La Orienta Stelo" la patro tamen pentis la adoptigon, kaj rezultiĝis proceso en Londono, kiun li tamen malgajnis. La frato estis destinita por gvidi la mondan politikon, kaj Kriŝnamurti por gvidi la spiritan parton. La plejparton de la tempo ili loĝis en Londono, kaj Kriŝnamurti estis edukita en la kredo ke li estos la nova mondosavanto, la reveninta Kristo.

En la teozofia movado oni komencis vidi ke la apero de granda spirita instruisto estas tre baldaŭa, kaj en Benares (nun Varanasio) la 11-an de januaro 1911 la teozofo George Arundale (1878-1945) fondis lokan ordenon, "Ordeno de la Leviĝanta Suno", kies celo estis kolekti homojn en Hindio por akcepti kaj helpi la estontan grandan spiritan instruiston. Sed jam kelkajn monatojn poste Leadbeater kaj Besant transprenis la ideon kaj transformis ĉi tiun ordenon al tutmonda organizo kun la nova nomo "Ordeno de la Orienta Stelo" – "The Order of the Star in the East", kiu poste alinomiĝis "The Order of the Star", mallongigite nur "The Star" – Esperante "Ordeno de la Stelo". Kriŝnamurti 15-jara estis enpostenigita kiel ĉefo aŭ prezidanto de "La Orienta Stelo", kaj poste samjare la 28-an de majo 1911 li 16-jara eldiras siajn unuajn oficialajn vortojn al kongreso en la ĉefsidejo de la teozofia komunumo en Londono.

En la granda teozofia kongreso en Adyar la 28-an de decembro 1911 okazis atentinda incidento. Estis kvazaŭ la sankta spirito enkarniĝis en la tuta salono, laŭdire. Al multaj tio estis la granda travivaĵo de ilia vivo, ili sentis sin tute ekstaze levitaj. Ĉeestantaj okultistoj konfirmis ke kelkajn sekundojn Kristo eniris la korpon de Kriŝnamurti dum ties parolado al la granda kunvenintaro. La teozofoj profetis la revenon de Kristo kaj havis la konvinkon ke Kristo poste enkarniĝos porkonstante en la korpo de Kriŝnamurti. Ili opiniis ke li estos la nova mond-instruisto, la reveninta Mesio, aŭ la enkarniĝo de Kristo aŭ de Lordo Majtrejo. (Ludowic Réhault, 1934).

Poste devis pasi 14 jaroj da mistika atendado, ĝis Besant en la somero 1925 solene deklaris ke ĉi tiu enkarniĝo nun estas tre baldaŭa, kaj ke Kriŝnamurti vere estis la estonta nova Mesio. La atendoj en 1925 estis iom post iom tre grandiĝintaj, ĉar li proksimiĝis al tiu aĝo de 30 jaroj, en kiu Jesuo ricevis sian iniciĝon sur la Monto de Transfiguriĝo. (Artikolaro 1, par. 5.7).


*Martinus en 1928*



*Martinus en 1934*

**4. Kial Martinus skribis leteron al Kriŝnamurti?**

En la libro *Martinus – kia ni memoras lin* (Zinglersens Forlag 1989), la unuan artikolon pri Martinus, *Mia ĉiutaga instruisto kaj konfida amiko,* aŭtoris en 1925 Lars Nibelvang (1879-1948). Ĝin sekvas kontribuo de Alf Lundbeck (1904-1990), kiu kun siaj patro kaj fratino helpis kaj ekonomie subtenis Martinus-on dum la periodo 1928-1932. Nibelvang kaj Lundbeck ambaŭ mencias en siaj taglibraj notoj la leteron, kiun Martinus skribis al Kriŝnamurti. Tiu letero ankaŭ estas mallonge priparolita en la revuo *Okkultisten*, februaro 1941 sur paĝo 39, kaj en aprilo 1943 sur paĝo 82.

Martinus rakontis ke li iam aŭdis Anne Besant prelegi en la palaceto "Odd Fellow" en Kopenhago, kaj li opiniis ŝin brila parolanto. Post tiu prelego li tamen ricevis fortan impulson sendi al Kriŝnamurti leteron por atentigi pri sia ekzisto kaj informi, ke la nova mondoklerigo venos el Danio. Tiu intuicia impulso estis tiel forta ke Martinus, rakontante pri ĝi, eĉ uzis tiajn esprimojn kiel "tio estis io, kion mi devis fari" aŭ "tiel estis ordonite al mi". – Martinus skribis la leteron ankaŭ por protekti Kriŝnamurti-n kontraŭ eraradoj, kiujn li eble poste bedaŭregus, kaj por efiki ke ĉi tiu afero ne peliĝu tro malproksimen ĉagrenige al ĉiuj koncernatoj. La letero, skribita danlingve, estis datita en Kopenhago la 4-an de decembro 1924 kaj estis adresita al la Prezidanto de "La Orienta Stelo", s-ro J. Kriŝnamurti.

Estas nenio ofenda en la dupaĝa letero de Martinus, ĝi estas tre ĝentila


*La subskribo de Martinus*


kaj afabla. Matinus nur informas, ke el Danio post nelonge eliros monda klerigo, kiu estos pledo por ĉiuj ekzistantaj estuloj, kiel li ankaŭ poste skribas en la antaŭparolo de *Livets Bog 1*. (par. 14-15). Li ankaŭ skizas la grandan amplekson de tiu mondoklerigo kaj ĝian naturon, pro kiuj li sentas sin instigita plej tenere sciigi, ke povos esti treege utile al Kriŝnamurti mem kaj iĝi beno al multaj homoj, se li povus senti sin instigita studi aŭ ekregi la danan lingvon. Martinus petas lin ne rigardi tion kiel admonon, aŭ kvazaŭ li estus ŝarĝita per ia respondeco. Sed per sia granda toleremo Martinus esprimas la saman varmon kaj amon al li, kion ajn li elektos decidi.

Martinus petas al Kriŝnamurti la komplezon ne turni sin al li fizike, ĉar tiutempe eblis al li labori absolute nur en la plej profunda silento kaj tute nerimarkate. Publikigo en tiu momento malfruigus aŭ eĉ damaĝus la laboron de Martinus. Li tial ne subskribis per sia nomo, sed per simbolo aŭ signo, komprenebla al ĉiu spirite altevoluinta homo. Kaj post kiam li finos siajn preparojn kaj disponebliĝos al la mondo, ne mankos la efektiviĝo de rekono de ilia dia parenceco.

Vojaĝante en Barato en 1954 Martinus ankaŭ renkontis Kriŝnamurti-n, kiel ni vidos poste en la ĉapitro.


**5. Per kiu signo Martinus subskribis sian leteron?**

La signo kiun Martinus uzis kiel subskribon, estis triangulo kun flamoj, situantaj ene de koro ĉirkaŭata de lumanta radiaro. La flamoj sur ĉiu latero de la triangulo similis al tiuj sur la triangulo kiu simbolas la finitan homon en la simileco de Dio laŭ lia bildo, plej malsupre dekstre en simbolo n-ro 21 en *La Eterna Mondbildo 2*. La finita homo povas tagkonscie sperti la kosmajn finrezultojn de la vivo, la strukturon de la




*La frontpaĝo de skiza kajero de Martinus, 1924*
*www.martinus.dk* *© Martinus Institut 1981*

universo aŭ koncize dirite: la solvon de la vivmistero mem. Tia homo travivis tiun plivastiĝon de la konscio, el kiu rezultas totala perfektiĝo de la intuicia kapablo aŭ kosma sensokapablo.




*La signo en la letero al Kriŝnamurti*
*© Martinus Institut 1981.*
*Fonto www.martinus.dk*

La nigra-blankan signon en la letero kiun li sendis en 1924 al Kriŝnamurti, Martinus poste aplikis en skizo de kolorita frontpaĝo de *Livets Bog,* kiun li pentris sur vitra plato de 8 × 8 cm. Per tiu vitra plato li povis montri la skizon de frontpaĝo kiel lumbildon en siaj prelegoj dum la jaroj 1928-1932 ĝis la eldono de *Livets Bog.* Sub la signo supre priparolita Martinus aldonis unu plian elementon, nome du manojn en reciproka manpremo kiel simbolon de pardono kaj amo. Por la efektiva eldono en 1932 Martinus tamen elektis meti la radiantan krucon sur la frontpaĝon de *Livets Bog.*

En pluevoluigo de tiu signo la kvar elementoj de triangulo, koro, pardona manpremo kaj radiaro daŭre troviĝas en la simbolo kiu ricevis la titolon *La finita homo en la simileco de Dio laŭ lia bildo* (simbolo n-ro 23, *La Eterna Mondbildo 2*). Tiu simbolo poste estis publikigita sur la frontpaĝo de *Livets Bog.* kiam en 1981 ĝi estis eldonita sub la ĉeftitolo *La Tria Testamento.*


En la letero al Kriŝnamurti, per kiu Martinus ĝentile kaj afable informis ke la nova mondoklerigo devenos el Danio, la signo per kiu Martinus subskribis la leteron do poste montriĝis esti parto de la frontpaĝa simbolo de tiu mondoklerigo. La signo do kunrolis en la afero je la unua komenco en 1924 kaj je la kompletigo de la verko en 1981, kiam *Livets Bog* estis eldonita de la publika eldonejo Borgen. (Vidu par. 13.18).




*Skizo de frontpaĝo de Livets Bog.*
*© Martinus Institut 1981.*
*Fonto www.martinus.dk*

### 6. Kial Lars Nibelvang skribis leteron al Besant?

Ĉar Nibelvang ankoraŭ estis la sola kiu sciis pri la vera naturo de Martinus kaj havis ian ideon pri la amplekso de lia misio, li sentis kiel devon apogi kaj



*Lars Nibelvang ĉe sia skribotablo. Sur la muro estis bildoj de la spiritaj majstroj interalie El Morya kaj Kuthumi*

helpi lin. Kvankam Nibelvang havis nur normalan enspezon de muzikisto, li tamen estis iom ŝparinta, kaj sur tiu bazo li decidis ekonomie subteni Martinus-on, tiel ke li povis maldungiĝi el sia ofico kaj tute dediĉi sin al sia spirita laboro. Martinus danke akceptis la oferton, sed li postulis ke ĝi estu rigardata kiel provizora prunto.

Ili vivis treege mallukse, kaj kiam Nibelvang senlaboriĝis, ili devis vivi sub tiel netolereblaj kondiĉoj, ke li sentis sin devigita provi ĉiun penseblan elturniĝon. Li prezentis al si ke la ellaborata mondbildo komencas velki, kaj li domaĝis la respondecon ke la viro kiu pro siaj unikaj kapabloj estas destinita skribi sian nomon inter la plej grandajn de ĉiuj tempoj, interrompu sian laboron de universala karaktero. Ĉio estas provenda, tiel ke neniu estonte povos riproĉi al li ke li ne klopodis per ĉio kio eblis al li.

Li tial decidis skribi al "La Orienta Stelo" por apelacii al komprenemo, apogo kaj helpo. Li pledis ke Martinus estas la elektito por esti mond-instruisto. Ja estis antaŭsupozeble ke "La Orienta Stelo" ne apogos plurajn, sed nur unu personon, nome la homon elektitan por fariĝi la mond-instruisto, la nova Mesio. – Nibelvang kredeble havis ian dubon ĉu la letero havos ian efikon, ĉar li anticipe faris al si la demandon: "Ĉu tiu ĉi asocio, malgraŭ sia tolerema kaj internacia formato, ne glitis en tiel kristaliĝintan formon ke grade iĝis fizike nefareble konstrui ponton inter ĝi kaj ni?"

Kial li elektis adresi la leteron ĝuste al Annie Besant? – Ĉar ŝi estis la unua kiu publike vere defendis la ideon pri la baldaŭa veno de mond-instruisto, interalie mem verkante librojn kaj farante milojn da prelegoj. Ŝi estis la animo de tiu granda organizo, kiu tutmonde staris preta por ebenigi la vojon al la venonta mond-instruisto. Nibelvang sekve opiniis ke ŝi estas kredeble ankaŭ tiu kiu havas moralan rajton kundividi lian sekreton, kaj verŝajne tiu kiu havas la plej bonajn intelektajn kaj spiritajn kondiĉojn por kompreni lin. Li sentis ankaŭ kiel serioza kaj intensiva elprovado estos al ŝi tia mesaĝo, sed aliflanke li neniam estus inda renkonti ŝin vid-al-vide, se li ne antaŭe donis al ŝi tiun ĉi plej grandan ŝancon de ŝia vivo. (Lars Nibelvang, Nia sinteno al La Orienta Stelo, 1925).

Nibelvang, kiu junaĝe ensuĉadis spiritan nutraĵon de Besant, neniam antaŭsupozis ke li iam levos sian plumon kontraŭ ŝi. Tamen Nibelvang sentis sin devigita argumenti kontraŭ Besant kaj la fundamenta teozofia sinteno pri la reveno de Kristo kaj motivi aŭ pruvi la mision de Martinus kiel mond-instruisto. Nibelvang tendencis kredi ke la tuta mondo kliniĝos antaŭ Martinus kaj liaj analizoj, kaj Martinus do ne tre favoris ke Nibelvang sendu la leteron. Sed al Martinus estis tre fremde riproĉi la opiniojn de aliaj aŭ argumenti kontraŭ ili, do kvankam tio ne plaĉis al li, li permesis al Nibelvang leteri al "La Orienta Stelo".

Martinus deziris resti anonima dum ankoraŭ kelka tempo, kio ankaŭ evidentiĝas el tiu loko en la memorlibro, kie Nibelvang mem raportas la respondon de Martinus al lia entuziasma ekkrio: "Vi estas Mahatmo, mondosavanto!" – "Ĉit! Ni ne parolu pri tio kiu mi estas, nek faradu komparojn. Mi al ĉiu unuopa estas nur tiu malmulto, multo aŭ nenio kiun la homo mem povas senti kaj vidi. Vi absolute ne priparolu ion al viaj amikoj kaj konatoj. Mia tempo ankoraŭ ne venis. Krome mi ne estas ŝatanto de la multaj rangoklasoj, al mi estas nur unu klaso – tiu de filoj de Dio." (Martinus – kia ni memoras lin, paĝo 23).

*Daŭrigo 2/3 kaj 3/3 sekvas.*
*Pli da informoj en "Martinus kaj la nova monda moralo", www.oletherkelsen.info.*
*La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.*
*Traduko Jens Stengaard Larsen.*



*Martinus prelegas en plena prelegejo en Martinus-Instituto dum la Grand-kurso en 1955*



# La Eterna Mondbildo – Grand-kurso

## de Ole Therkelsen

*Grand-kurso* estas nova libro, kiu laŭplane eldoniĝos en majo 2018. En septembro 1955 Martinus decidis krei serion da prelegoj, kiuj okazis dum dekkvin ĵaudoj en la vintra jarduono 1955-1956. Martinus skribis:

"Eta grupo de civilinĝenieroj ene de la amikaro de mia afero kreis kunlaboron pri registrado de miaj prelegoj kaj kosmaj analizoj por benda kaj diska reaŭskultigo. Mi tial decidis krei kompletan trairon de la kosmaj analizoj de la universo avantaĝe al tiu registro. Ĉi tiu kompleta trairo tiumaniere estos poste akirebla forme de bendo kaj disko, same kiel ĝi kompreneble ankaŭ estos transigata al libroformo. Tiel estiĝos unika okazo, por amikoj kaj interesatoj de mia afero, sperti ĉi tiun mian personan trairon de la tuta mondbildo je ties ĉiuj esencaj detaloj, okazo, kiu plejverŝajne neniam estos ripetata.

Per via aliĝo al tiu totala trairo de la kosmaj analizoj de la mondbildo, tio ne nur estus netaksebla utilo por vi mem en la studo de la eternaj faktoj, sed tio ankaŭ signifas káj fizika káj psika apogo por mi en tiu granda kaj serioza tasko. Per viaj intereso kaj simpatio pri mia tasko vi tiel helpas certigi aliron por la mondo al ĉi tiu fundamenta kulturdokumento". (Kontaktletero n-ro 19, 1955.09.16)

La unuaj vortoj en la "*Grand-kurso*" estis: "Mia prelego ĉi-vespere estas la unua en serio da prelegoj, kiujn mi nomigis *"La eterna mondbildo"*. La prelegoj alcelas doni kompletan, tutecan analizon de la portantaj principoj de la universo por tiel krei vivfundamenton por tiuj homoj, kiuj estas maturaj por kompreni tion.

En letero 1955.10.01 Martinus skribis al la islandana tradukisto Vignir Andrésson:

"Kiel antaŭe menciite, miaj prelegoj kaj kurso estos surbendigataj por poste esti transigataj al libroformo kaj diskoj. Rilate al tio mi decidis krei *Grand-kurson* pri la kosmaj analizoj de la universo. Ĝi komenciĝos la 6-an de oktobro ĉi tie en la prelegejo de la instituto kaj estos trairo de la kosmaj analizoj kaj la eterna strukturo de la mondbildo je ĉiuj detaloj de A al Z, akompanate de ĉiuj simboloj kaj aliaj suplementaj bildoj. Estos unika okazo por miaj amikoj ĉi tie en Kopenhago ĉeesti ĉi tiun mian personan kaj buŝan trairon de la eternaj faktoj je sia tuta etendiĝo, okazo, kiu plejverŝajne neniam estos ripetata. Ĉi tiu granda trairo de la mondbildo estos registrata sur bendon, de kie ĝi poste estos transigata al libroformo kaj diskoj. Ĉi tiu trairo tiel iĝos la plej granda kaj plej kompleta kurso, kiun mi ĝis nun donis pri la totala analizo de la vivo, kaj ĝi tiel estos vera *Grand-kurso*, kies teksto plenigos centojn da libropaĝoj. Kiam ni venos al tio, ĝi multe plifaciligos la studrondan laboron

ĉirkaŭe en la mondo." (1995-10-01, el la leterdatumbazo, martinus.dk).

La prilaboro de la teksto fare de Ole Therkelsen kaj la redaktado de Trine Möller kaj Per Jan Neergaard estis aprobita de la konsilio de Martinus-Instituto en februaro 2018.

La 2018.05.05 per solena libra akceptejo en Kopenhago kaj Stokholmo la nova libro estos eldonita en respektive dana kaj sveda lingvo.



*Martinus kun* Livets Bog *en la Instituto en 1955, la jaro de la* Grand-kurso. *En la fono estas la tiel nomata ĉefa simbolo,* La eterna mondbildo, la viva estulo 2, la eterna Dio kaj la eternaj difiloj. *Vidu la frontan paĝon kaj la resumon de la klarigo de simbolo n-ro 11 sur paĝo 2.*

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.






# Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

## Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en *La Tria Testamento* "ĉio estas tre bona" el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas "alturni ankaŭ la alian vangon" kaj "ami sian proksimulon kiel sin mem" scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.




## Eo-semajnoj en Martinus-Centro en 2018

Inter la 28-a de julio kaj 11-a de aŭgusto 2018 la Esperanto-semajnoj en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Estos prelegoj, studrondoj, konversaciaj rondoj, kaj en la vespero estos distra programo, teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Pli da informoj ĉe esperanto@martinus.dk

## Kiel trovi Martinus-Centron en Klint

De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon, al Højby aŭ Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per aŭtobuso n-ro 563 aŭ per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.

Martinus-Centro